pdf. iompostiom .net 008

internacia reta printebla gazeteto – kompostita el retaj fontoj – por sur la tablo en esperantaj medioj

Tutmonde

Jarkunveno de la Afrika Disvolva Banko

Legu la plenan artikolon en raporto.info

La 16-an de majo jarkunveno de la Konsilio de la Afrika Disvolva Banka Grupo de 2007 inaŭguriĝis en la Internacia Kongresa Centro en Ŝanhajo. Ĉina ĉefministro Wen Jiabao faris paroladon en la inaŭguro.

La kunvenon ĉeestis Paul Kagame, prezidento de Rvando, Pedro Pires, prezidento de Verdakabaj Insuloj, Marc Ravalomanana, prezidento de Madagaskaro kaj Donald Kaberuka, estro de la Afrika Disvolva Banko.

La temo de la jarkunveno estas “Afriko kaj Azio - disvolvaj partneroj”. Oni diskutos pri infrastruktura konstruado en Afriko, tutregioniĝo kaj forigo de malriĉeco.

Amuze

Legu pli da ŝercoj ĉefpaĝe ĉe lernu.net

Onklino de la knabo malĝojas, ĉar ŝia dekjara nevo ankoraŭ suĉas la polekson. Por ke la nevo haltu la polekso-suĉadon, ŝi provas timigi lin:
- Ne suĉu la polekson! Se vi daŭrigos la suĉadon vi ŝvelos kaj ŝvelos ĝis kiam vi krevos!
La onklino ŝvelas la vizaĝon kaj svingas la brakojn, por montri krevadon.
La knabo timegas. Li ĉesas suĉi polekson. Neniam plu li polekson suĉis.
Post iom da tagoj, la knabo veturas buse. Virino graveda sidas apude. Vidante la ventron de la virino, la knabo diras al ŝi:
- Mi scias kion vi faris!

Opinie

Sovetiaj filmoj kun subtekstoj en Esperanto

Afiŝo de rex_cyrus *en esperanto.livejournal.com*

Saluton!

Mi invitas ĉiujn viziti mian projekton Kino en Esperanto rete, kie mi publikigas subtekstitajn en Esperanto sovetiajn filmojn. Oni povas spekti ilin rete ĉe Google Video, aŭ elŝuti en DivX-formato kaj spekti sur komputilo aŭ DVD-aparato, kiu apogas ĉi tiun formaton. Mi povas noti, ke tio estas unua provo sisteme prezenti filmojn, tradukitajn Esperanten - ĝis nun tia praktiko ne disvastiĝis, bedaŭrinde. Mi esperas, ke ĉi tiu projekto sukcesos, kaj volonte aŭskultos viajn opiniojn pri ĝi.

Korespondpete

Per edukado.net vi povas serĉi aliajn petojn kaj vi povas mem aliĝi al la servo.

El Pollando

http://www.edukado.net/individuaj/9104

Piotr Szatkowski, viro, 1992, komencinto

Saluton! Mi estas Petro kaj mi tajpas el Pollando. Mi ŝatus babili kun vi pri ĉiuj temoj.

El Kongo (Brazavila)

http://www.edukado.net/individuaj/9107

Godet Matoko, viro, 1980, komencanto

Mi deziras havi amikojn el la tuta mondo